

---

INDICE

- I nostri prossimi incontri
- Per iscriversi al Circolo
- Assemblea Generale del CEM
- Riunione del Consiglio del 3 gennaio 2023
- Traduka Seminario en la Chaux-de-Fond
- Sperto en radia studio
- Junulara Esperanto Semajno (JES) 2022-2023
- Prelego de Giorgio Silfer en Milana Esperanto-Klubo
- Notizie dal mondo

**Circolo Esperantista Milanese**

Via De Predis 9 - 20155 Milano - tel. 339 1642624

*e-mail:* milano@esperanto.it

*rete:* www.esperantomilano.it

C.C.P. 26448209

IBAN: IT36 J076 0101 6000 0002 6448 209

## **I NOSTRI PROSSIMI INCONTRI**

**ore 21,15**

*aperti a tutti gli interessati: soci e non soci*

**GLI “INCONTRI DI CONVERSAZIONE”** del mercoledì, dalle ore 17 alle ore 19, sono ripresi regolarmente in sede. È sempre possibile partecipare on line a mezzo Skype mettendosi in contatto direttamente con Bruno Marcandalli (tel. 339 1642624; e-mail: [marcandallib@gmail.com](mailto:marcandallib@gmail.com)) per ricevere il link di invito.

### **Venerdì, 27 gennaio 2023**

Dopo il consueto incontro conviviale presso il ristorante “Ciccio bello”, la serata è proseguita nella sede del Circolo con la conferenza di Luca Calvi su:

#### **Le lingue della montagna**

Il Presidente ha esposto un *programma di massima per le prossime conferenze in sede*, come segue:

### **24 febbraio 2023**

Fausto Nenci ci aggiornerà su:

#### **Serve una lingua comune nella costruzione di siti internet? CMS a confronto**

### **17 marzo 2023**

Presentazione del libro di Andrea Maulini

#### **Comunicare la cultura oggi**

### **15 aprile 2023**

Crema: “Giornata Marignoni” – Conferenza di Michele Gazzola sul tema

#### **Giustizia linguistica, plurilinguismo e comunicazione nell’Unione europea**

### **23 giugno 2023**

Conferenza di Davide Astori su:

#### **L’Homaranismo di Zamenhof**

Naturalmente per ogni occasione verrà inviata precisa informativa a tutti i soci e amici del CEM.

## **PER ISCRIVERSI AL CIRCOLO**

Ecco l’elenco delle quote, con possibilità di scelta fra le varie combinazioni, sempre comprensive dell’iscrizione a CEM e FEI.

*Le quote solo locali del CEM, poste tra parentesi, sono riservate esclusivamente a qualche s-ano che è già socio FEI e desidera iscriversi anche da noi.*

	<b>Quota solo CEM</b>	<b>Quota CEM+FEI</b>
Socio ordinario	(34,50)	57,00
Socio giovane	(17,25)	28,50
Socio familiare	(17,25)	28,50
Socio sostenitore FEI e CEM	(103,50)	171,00
Socio garante FEI e CEM	(345,00)	570,00
Socio ord. FEI e sost. CEM		126,00
Socio sost. FEI e ord. CEM		117,00

La quota di Gruppo (comprendente la rivista) è di € 10.

Sono Soci giovani con quota ridotta i nati dal 1° gennaio 1998.

Il Socio familiare è allo stesso indirizzo del socio titolare.

**Per quanto riguarda la quota associativa FEI si informa che coloro che desiderassero ricevere la copia cartacea della rivista “L’esperanto” dovranno versare un supplemento di € 5,00. In ogni caso sarà inviata la copia on line senza supplemento.**

Il pagamento può essere effettuato mediante bonifico usando l’IBAN **IT36J076010160000026448209** oppure con bollettino postale sul **Conto Corrente Postale 26448209** entrambi intestati al Circolo esperantista Milanese **esplicitando in causale la tipologia di iscrizione come sopra riportato**. È possibile anche aggiungere ulteriori cifre come donazione al CEM o come libero contributo al Fondo pro-sede per sostenere i costi di mantenimento della sede o come Fondo per attrezzature, sempre libero.

In ogni caso, in occasione delle riunioni in sede o conviviali, sarà possibile anche effettuare l’iscrizione di persona al Segretario.

Per qualsiasi altra informazione rivolgersi al Segretario Bruno Marcandalli (tel. 3391642624; e-mail: [marcandallib@gmail.com](mailto:marcandallib@gmail.com))

### **ASSEMBLEA GENERALE DEL CEM (18 novembre 2022)**

Il 18 novembre 2022 si è svolta in sede l’Assemblea Generale del Circolo. Il Presidente Foà ha illustrato l’attività svolta dal CEM nel corso del 2021 e il Tesoriere Tomei ha esposto la Relazione Finanziaria sempre relativa al 2021. Come previsto dallo Statuto ha

avuto luogo l'elezione del Consiglio per il biennio 2023-2024. A tale riguardo il Presidente in carica, Aldo Foà, ha comunicato che, per ragioni personali, non intendeva ripresentarsi quale candidato al Consiglio e, di conseguenza, non avrebbe potuto rivestire la carica di Presidente per il prossimo biennio. L'Assemblea esprime il proprio rammarico per tale decisione e ringrazia Foà per il suo lavoro, impegno costante ed entusiasmo manifestati durante tutta la sua Presidenza in un momento molto difficile per il Circolo.

Sono risultati eletti quali **Consiglieri:**

Francesco Fagnani, Luigi Fusi, Matilde Mantelli, Bruno Marcandalli, Luciano Mignani, Andrea Montagner, Giuseppe Pranzo, Guglielmo Tomei, Gabriella Zanni

Come membri del **Collegio dei revisori:**

Ezio Biffi, Ruben Conti, Diego Lo Testo

Nel seguito l'Assemblea, tenendo conto della costante riduzione dei soci, legata anche alla difficile situazione generale dell'ultimo biennio, problema che si auspica che il nuovo Consiglio possa superare, ha deciso di ridurre il numero dei Consiglieri da 9 a 5. Tale decisione, come previsto dall'Art.10 dello Statuto, andrà in vigore dopo il prossimo biennio. Sul tema di come invertire questa tendenza negativa è seguita un'ampia discussione sulle possibili iniziative.

### **RIUNIONE DEL CONSIGLIO DEL 3 gennaio 2023.**

In tale data si è svolta la riunione del nuovo Consiglio del Circolo che ha provveduto all'elezione del nuovo Presidente. È risultato eletto **Andrea Montagner**, che ha vivamente ringraziato il Consiglio stesso e l'Assemblea per la fiducia accordatagli rivolgendosi a tutti i soci con il seguente messaggio:

“Care amiche e amici,

ho avuto l'onore e l'onere di essere eletto presidente del Circolo Esperantista Milanese. È emozionante pensare che ricoprirò questa carica perché conosco bene quanta energia e tempo è stato speso da chi mi ha preceduto per arrivare al punto in cui siamo arrivati, dai fondatori nel 1906 sino agli amici che ci hanno recentemente lasciato.

Sono consapevole del carico di lavoro che pende su di me, prima di tutto quello di comunicare la nostra esistenza, portatori di un ideale di pace, fratellanza e solidarietà che si esplica nel poter parlare una stessa lingua senza che qualcuno si senta superiore ad un altro.

In secondo luogo, rivitalizzare la “mission” del CEM quale luogo in cui organizzare eventi che gli diano centralità per acquisire strumenti nuovi di cultura, di innovazione, di crescita comune.

In terzo luogo, uscire per andare dove la gente va per partecipare a feste, fiere, sagre e far conoscere la nostra lingua.

Vi giunga dunque il mio saluto e ringraziamento: se leggete queste poche righe vuol dire in qualche modo le attività del Circolo vi interessano.

Spero che potremo conoscerci di persona e da parte mia ascoltare vostre proposte e suggerimenti per migliorare la vita del Circolo.

Io stesso ho proposto al Consiglio di restare aperti dalle 19 alle 21 proprio per permettere alle persone di ritrovarsi per una cena frugale e uno scambio continuo di opinioni.

Un caro saluto Andrea Montagner”.

Il Consiglio ha anche confermato **Bruno Marcandalli quale Segretario** e **Guglielmo Tomei quale Tesoriere** del CEM

---

È online il nuovo sito del CEM [www.esperantomilano.it](http://www.esperantomilano.it). Nella sezione eventi futuri ci sono le iniziative programmate e nella sezione "news" è presente il link all'intervista che Andrea Montagner, Matilde Mantelli e Diego Lotesto hanno fatto a Kristal Radio il 17 gennaio 2023.

### **TRADUKA SEMINARIO EN LA CHAUX-DE-FOND**

Kiel en la pasintaj jaroj mi partoprenis en la traduka seminario de Kultura Centro Esperantista en La Chaux-de-Fond, Svislando, de la 1a ĝis la 8 a de aŭgusto 2022.

La seminarion gvidis Perla Martinelli, kaj ĉeestis homoj el diversaj nacioj. La ĉijara celo estis esperantigi la konatan leteron al Tacito de Plinio la Juna, kiu priskribis la grandaniman morton de Plinio la Aĝa dum la fama erupcio de Vezuvio en la jaro 79. La laboro plene sukcesis kaj la traduko aperos en unu el la eldonotaj numeroj de Literatura Foiro.

En la antaŭaj jaroj la traduka grupo faris alian bonegajn laborojn: inter ili en 2021 ĝi zorgis pri la tradukon de la novelo "La canzone di guerra" de Buzzati, kaj en 2018 la tradukon de la tuta dramo "Fin de partie" de Samuel Beckett. Ambaŭ tradukoj poste aperis en Literatura Foiro.

La tradukteamo funde esploras la lingvon de la originalaj tekstoj, diskutas pri la senco de ĉiu frazero, kaj eĉ de ĉiu vorto, kaj fine klopodas redoni ĉiujn nuancojn de la originalo en bona kaj polurita Esperanto, kaj pro tio estas granda plezuro partopreni en la seminarioj.

*Giuseppe Pranzo-Zaccaria*

## **SPERTO EN RADIA STUDIO**

Kiu povis imagi, ke mi, neniulo, estus intervjuita de Milana radio pri mia pasio Esperanto? Nu, tiel okazis!

La bibliotekisto de mia universitato – Andrea Montagner – estas siavice esperantisto. Danke al li, kiu kontaktis Kristall Radio-n, mi spertis mian unuan alproksimiĝon al la radia mondo.

La posttagmezon de mardo, la 17-a de januaro, mi renkontis lin kaj alian samideaninon en trinkejo proksima de la IEF-sidejo, por iom klarigi niajn ideojn pri nia tuj baldaŭa intervjuo ĉe la supre menciita radio, tiuvespere.

Fakte, Kristall Radio (Kristall Radio | La Radio di Milano | FM 96.2) pretigis por ni unuhoran dialogon pri la internacia lingvo. Estis ankaŭ bona muziko, tradukita de famaj internaciaj kantoj – ekz. 'Hello' de Adele aŭ 'Firework' de Katy Perry – aŭ verkita en Esperanto mem, kiel Mozaiko de Kjara Raggi.

Andrea, la sinjorino Matilde Mantelli kaj mi amike babilis kun la du scivolemaj intervjuintoj, respondante al iliaj demandoj, en kaj neformala kaj informiga diskuto. Dum nia interveno, pluraj mesaĝoj estas ricevitaj en la ekranoj de la komputiloj en la studio, senditaj de la geaŭskultantoj, kun variaj bondeziroj kaj komplimentoj, krom emoj lerni Esperanton kaj informiĝi pri ĝi!

Certe estas, ke ni tri amuziĝis kaj sukcesis plie konigi niajn aktivaĵojn, niajn intencojn kaj super ĉio nian amon rilate al Esperanto.

Konkludante, mi estas dankema pro la agrabla vespero. Ĉu vi ŝatus havi kompletan ateston pri la evento? Jen la video!

<https://youtu.be/pzXwOlrIDyl>

Ĝis tre baldaŭ, karaj!

*Diego F. Lotesto*

## **JUNULARA ESPERANTO SEMAJNO (JES) 2022-23**

Esperanto ebligas vivi ĉiujn jarpartojn kaj -festojn kune kun gesamideanoj, daŭrigante lerni! Do, jen kial mi ege volonte pasigis la novjaran nokton en Germanujo, partoprenante la JES-n, la finjaran, unusemajnan aranĝon, kiu en tiu ĉi kazo brakumis la komencon de 2023. Ĝi okazis en Löwenberger Land, komunumo iom lin orde ol Berlino. Kiel ĉiam, la evento oferis al mi multajn aktivaĵojn por kreskigi miajn konojn kaj kapablojn rilate al pluraj temoj: ekzemploj inter ili estis teatro, eskterlandaj dancoj, (kart)ludoj, kino, muziko kaj interesaj scivolemoj (ankaŭ pri Italio mem)! Pritrakante pratikan aspekton, mi havis la okazon – se ne la devigon – pli maturiĝi: mi akiris pli efikajn organizkapablojn. Mi ekzemple nepre devis trovi iom da tempo por studi pro alproksimiĝinta universitata ekzameno, kaj mi bonŝance realigis mian volon. Mi trovis oportunan temp subdividon de miaj tagoj, laŭ la rimedoj, pri kiuj mi disponis.

Aldone, mi afirmas, ke ĉi tiaj spertoj en kaj fizika kaj emocia loko kiel Esperantujo, ofte permesas al mi iĝi pli respondeca juna plenkreskulo. Sammaniere, ili helpas homon kiel mi pli bone kompreni, kio pli gravas kaj taŭgus fari. En la pasinteco, mi ofte havis malfacilecojn rapide taksii la situacion kaj agi konsekvive, ĉar estis tro da opcioj por elekti. Nun, mi progrese estas akiranta tiun ĉi kapablon. Homnivele, kiel kutime, oni povis ekkontakti multenombrajn kulturojn kaj tradiciojn el la tuta mondo; siaj sociaj rilatoj povis esti ekzercataj. Oni iĝas ero de mirinda, mondcivitana mozaiko. Respekto por la aliaj, kreado de novaj sentoj, aparteno al tute nekutima, tamen altvalora homgrupo kontentigis kaj kontentigas min pleje!

Dum simila evento kiel JES, mi estas aparte atenta al la media aspekto, kiu ĉiam restas kara al mi: ne mankis naturo; senlimaj arbaroj troviĝis ĉirkaŭ la loĝejo "Am Wald".

Kaj kiel ne povi rakonti pri la proksimaĵoj de la kongresejo? Kredu min aŭ ne, sed mia restado en Germanio enhavis ankaŭ "historian lecionon", tiun pri la koncentro de Sachsenhausen (pr. Zaksenhäusen), ĵus ekster la centro de la urbeto Oranjenburgo, kiu funkciis de 1936 ĝis 1945. Povi lerni iom pri la realaĵo de foraj jaroj – sed ne tro – estis tre sugestia, kaj donis al mi pli detalan kadron de la loko, apud kiu mi ĉeestis JES-n. Berlino, kun siaj konategaj vidindaĵoj, estas urbo, *kiun oni amas aŭ malamas*. La muro, la Brandeburga arko, la parlamenta konstruaĵo (Reichstag) ktp sentigis min pli konektata

kun la realaĵo. Mi konfesas, ke mi jam klopodis dufoje viziti la Germanan ĉefurbon, sensukcese pro la pandemio. Do jen alia atingita alvenpunkto! Por konkludi: JES plaĉis al mi. Ĝi povas kompreneble esti plibonigata (ne plu nur la vegetara manĝebleco, bonvolu!); ĉiam estos plibonaĵoj kaj malplibonaĵoj, tio estas unu el miaj devizoj. Miaopinie, eblas trovi ĝeneralan sencon rilate al la JES-sperto: akcepti la novan jaron, pretigante sin al ĉiuj ĝiaj venontaj defioj, okazoj, fendaĵoj, kun espero kaj pozitivaj intencoj! Kaj kiu pli bona okazo por tio povus ekzisti, sene esti kun gekaruloj kaj geamikoj?!

*Diego Lo Testo*

### **PRELEGO DE GIORGIO SILFER EN LA MILANA ESPERANTO-KLUBO**

Vendredon la 1-an de decembro, vespere, ni renkontiĝis ĉe nia klubo por aŭskulti la prelegon de la samideano Giorgio Silfer.

Post agrabla vespermanĝo ĉe la restoracio Ciccibello, ĉirkaŭ 20 personoj de la Milana Esperanto-Klubo rekuniĝis por ĉi tiu prelego. Temo de la prelego estis la prezentado de du libroj. La unua, titolita “La verda stelo kaj la roza triangulo” estas antologio, zorgita de Giorgio Silfer, kiu rilatas al la ĉeesto de la gejismo (kiun G. Silfer vokis “Uranismo”) en la esperanta literaturo. La dua, titolita “Esperantio vivas” estas komiksa libro verkita kaj desegnita de du esperantistoj membroj de la Esperanta Civito, t.e. N. Vanof kaj T. Lovric, kiu ĉefe volis montri la politikan strukturon kaj la fikciajn agojn de ĉi tiu estaĵo.

Komenciĝante per la unua verko, oni devas rimarki, ke Silfer tute ne klarigis la signifon de la titolo. Ni povas pensi ke ĝi havus rilaton kun la roza triangulo uzita por marki la samseksemulojn en la naziaj ekstermejoj, sed ne estas klara la konekto kun la verda stelo. Tio fakte ne evidentiĝis dum la prelego.

La preleganto montris klare al ĉiuj, ke estis multenombraj la esperantaj verkistoj kiuj interesiĝis pri la temo de la gejismo dum la historio de la movado. Li citis multajn nomojn de verkistoj kiuj pritraktis tian temon, kiel ekzemple Sturmer, Stuttard, Rossi, Zadlav kaj aliaj, per poeziaĵoj, teatraĵoj kaj prozaĵoj.

Li ankaŭ parolis pri sia freŝdata vojaĝo en Hungarujo kaj pri du bone konitaj verkistoj kiuj ne ĉeestas en la antologio. Ili estas la hungaraj Baghy kaj Kalocsaj. Aŭskultante Giorgio Silfer ni klare komprenis ke la du tute ne simpatiis inter ili.

Pli precize, Silfer klarigis ke ili multe taksis unu la alian, sed tio ne okazis por iliaj sekvuloj kaj admirantoj. La preleganto priskribis bone ankaŭ la malfacilan vivon kiun ili havis en la tiutempa Hungarujo, kiu estis regno sen reĝo kaj kie la povo estis en la mano de la reganto, nomiĝinta Miklos Horthy, mararmea admiralo en lando sen maro, sed kun la granda lako Balaton.

Poste, la preleganto pasis al la dua libro. En ĝi la verkistoj skizis per komiksoj rakonton en kiu ili montris la fikcian aktivadon de kelkaj anoj kiuj estis elektitaj en la senato de la Esperanta Civito, kultura kaj politika organizaĵo kiu komencis sian agon en la jaro 2001.

Laŭ la preleganto, per lego de la rakonto ni povas kompreni kiel ĉi tiu organizo estas regata kaj bone lerni la fundamentajn ideojn kiuj kondukis al ĝia kreado. La preleganto longe klarigis ke tiu organizo multe malsamas ol la aliaj kiuj ekzistas en la esperanta movado, ĉar ĝi ne estas simpla asocio kiu nur havas estraron por sia kompleta mastrumado.

Ĝi kontraue estas strukturita kiel vera ŝtato, kun ĉiuj ĉefaj povoj necesaj por havi efika regeblecon. Laŭ la preleganto, ĉi tiu formulo estas la ĝusta maniero por atingi veran kreskon de la esperanta movado en la mondo.

Je la fino de la prelego stariĝis du demandoj.

La unua estis por scii ĉu la esperantaj verkistoj estis kapablaj alporti novajn ideojn en la priskribon de la geja mondo kaj plibonigi ĝiajn rilatojn kun la eteroseksa parto de la socio.

La dua por kompreni ĉu la agado de Esperanta Civito gajnis signifajn sukcesojn kaj estas efike plivastiganta la esperantan movadon helpante la atingon de la Zamenhofaj celoj.

La respondo de la preleganto al la unua demando estis, ke ĉefe la temoj kaj la ideoj montritaj en la esperantaj verkoj pri la gejismo similis al ĉiuj tiuj en la verkoj per naciaj lingvoj, kaj sekvis la samajn bazajn ideojn kaj principojn.

Tamen, la fakto ke ili estis ofte preterpasitaj pravas ke la esperanta mondo estis eble pli rapida en la kompreno de la evoluo de la homaro pri la fundamentaj temoj de gejismo kaj de homrajtoj. La respondo al la dua estis ke ni devas esti kapablaj atendi. Post la foriro de Egiptujo, la hebreoj vagis dum 40 jaroj en la deserto. La vigla agado de la Esperanta Civito nur daŭris ĉirkaŭ 20 jarojn, do laŭ la preleganto ĝi havas ankoraŭ longan tempon por atingi siajn unuajn konkretajn

rezultojn. La ĉeestantoj multe ŝatis la fluan kaj interesan prelegon kiu estis intense aplaŭdita de niaj klubanoj, kiuj ankaŭ havis la eblecon aĉeti surloke la prezentitajn librojn.

*Guglielmo Tomei*

## NOTIZIE DAL MONDO

Kiel certe ĉiuj legantoj ĉi tiun bultenon scias, en Torino de la 29-a de julio ĝis la 5-a de aŭgusto 2023 okazos la **108-a Universala Kongreso de Esperanto**. La temo de la Kongreso estos: "Enmigrado kaj kunfluo de homaj valoroj". Dum kaj post la kongreso okazos pluraj ekskursoj - duontagaj, tuttagaj, plurtagaj.

Detalojn pri la programo kaj la aliĝmaniero oni povas trovi en: <https://www.esperanto.it/torino2023/> kaj <https://uk.esperanto.net/2023/>

Ankaŭ en 2023 la Itala Esperantista Junularo organizos sian **Internacian Junularan Festivalon (IJF)**, ĉijare en regiono kiu neniam gastigis la eventon: Kalabrio.

La Festivalo okazos en Palmi (RC) de la 5-a ĝis la 11-a de aprilo, kiel kutime dum la paskaj ferioj. Aliĝu tuj ĉe <https://forms.gle/7uG53fgSJGk4EYiEA>

**La 56-a ILEI-KONGRESO** okazos en Lignano Sabbiadoro de la 5a ĝis la 12a de aŭgusto; ĝi estos granda kongreso kun ankaŭ ebleco ferii ĉe la maroj je malaltaj prezoj.

Ĉef-temo de la Kongreso: "Instrui Esperanton en lernejoj"

Retejo de la Kongreso: <https://2023.kongreso.org/>

Por aliĝi: <https://2023.kongreso.org/alighilo.php>

Jen la ligilo por rekte eniri la paĝon por informoj: [https://2023.kongreso.org/ILEI\\_chefa.php](https://2023.kongreso.org/ILEI_chefa.php)

## Parma Esperanto-Asocio "Giorgio Canuto":

"*L' almozulo*" - Membroj de Esperanto-Asocio "Giorgio Canuto" de Parma, Italio, legas la poemon "L' almozulo" de Raymond Schwartz. Ĝi estas parto de lia poemaro "La Stranga Butiko", kiun ILEI proponis por la internacia komuna legado de la Tago de la Esperanta Libro 2022.

[https://www.youtube.com/watch?v=wV7K4CX\\_2Hc](https://www.youtube.com/watch?v=wV7K4CX_2Hc)

**AMO 98:** Okazos la 19-an de februaro, 2023 en Zagrebo, Kroatio. Estos hibrida kunsido, virtuale per **ZOOM: 14.00-18.00 (UTC+1)**. Temo:

'Amikeco: ni nutru ĝin kiel oni nutras fajron'. Temas pri la ĉiujara festado de la Semajno de Internacia Amikeco delonge festata de UEA kaj en pluraj landoj, inkluzive de Kroatio. Ankaŭ ĉi-jare okazos en Kroatio foto-konkurso. Temo sama kiel de la seminario. La fotojn oni sendu ĝis la 10-a de februaro 2023 al la retadreso: [hes.keu@gmail.com](mailto:hes.keu@gmail.com)

**AMO 99:** Okazos inter la 4-a kaj 7-a de marto en Pardubice, Ĉeĥio, kunlabore kun la fervojistoj en IFEF kaj la projekto VERDEN de IFEF kaj la faciliga instanco Kosmo. La temo certe rilatos al la evoluigo de la fervojoj. Estos hibrida kunsido.

**La Lerneja Scienca Kalendaro 2023**, eldonita de la Supera Konsilio por Scienca Esplorado de Hispanio (CSIC), ĉi-jare denove havas version en Esperanto.

La kalendaro enhavas kolekton de eventoj aŭ datrevenoj ligitaj al scienco (en ampleksa senco) por ĉiu tago de la jaro, kun speciala atento al la diverseco de la ĉefroluloj. Vi povas ĝin trovi, elŝuti kaj printi en pluraj versioj el: <https://digital.csic.es/handle/10261/285166>

La kalendaro en Esperanto havas propran tŭiteran konton, kiu ĉiutage publikigas la koncernajn datrevenojn. Pri la tradukado zorgis teamo kunordigita de Hispana Esperanto-Federacio. Menciono pri Esperanto kaj agnosko al la kunlaboro de HEF aperas en la oficiala prezento fare de la CSIC, kiu okazis ĉi-matene, kaj kiun vi povas trovi ĉe: <https://www.csic.es/es/actualidad-del-csic/el- calendario-cientifico-escolar-2023-ya-esta-listo-con-nuevas-efemerides>